

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 12 * 18. Dec. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

La Brazila Komercio por Esperanto.

Zoppot, la Perlo de l' Orienta Maro.

La prezidanto de „Brazila Ligo Esperantista“ kaj tiu de la Organiza Komitato de la Sesa Brazila Kongreso de Esperanto sendis al la Komerca Asocio de Rio de Janeiro, kiu estas samtempe Federacio de la Brazilaj Komercaj Asocioj, raporton pri la nuna stato de la propagando de Esperanto en la tutmonda komercio.

Tiu ĉi raporto estas legita en ĝia lasta kunsido, okazinta la 11. nov., kaj la Komerca Asocio unuanime aprobis la jenan gravan deziresprimon:

„La komercio de Rio de Janeiro, certa, ke la helpa lingvo Esperanto, kies realigbleco estas praktike kaj tutmonde pruvita, povas fari kaj jam faras grandajn servojn al la komercaj rilatoj inter la nacioj, decidis doni al la proksima Sesa Kongreso de Esperanto sian tutan moralan helpon, kaj pri tio oni komunikis al Brazila Ligo Esperantista“.

S-roj Araujo Franco, Afonso Vizeu, d-ro Augusto Ramos kaj J. Dias Tavares, respektive efektiva prezidanto, honora prezidanto, unua sekretario kaj direktoro de la Komerca Asocio akceptis esti patronoj de la Sesa Brazila Kongreso de Esperanto.

Rio de Janeiro, la 16. nov. 1920.

A. Couto Fernandes,
Prezidanto de BLE.



Zoppot. — Surmara Ponto.

Gazetaro.

JORNAL DO COMMERCIO. Rio de Janeiro. 12. Nov. Grandegformate (24 paĝoj po 67:52 cm). La plej grava ĵurnalo de Brazilio. Enhavas artikolon de ses longaj kolonoj pri la kunsido de la Komerca Asocio de Rio, en kiu estas akceptita la ĉi-supre repesita dezir-esprimo pri Esperanto, kun multaj argumentoj pravigantaj la enkondukon de Esp. kaj kun longa listo de la lastatempaj sukcesoj de la internacilingva movado.

M. C. U. (Ĵurnalo de la Foiroj kaj Ekspozicioj). N-roj 1, 2 kaj 3 (la lasta de 3. dec.) Eldonata en Paris 16, rue de Chaillot 3

Grava komerca ĵurnalo semajna en franca lingvo. La subtitolo estas presita en ses lingvoj: franca, angla, hispana, portugala, itala kaj Esperanto.

En Bromberg-Bydgoszcz (Polio)

la gazetaro ŝajnas tre favori nian aferon. „Volkszeitung“ n-roj 18 kaj 19 enhavas tradukojn el kaj artikolojn pri Esperanto. „Nowe Tory“ (La Novaj Vojoj), „sendependa organo politika, socia kaj literatura“, enhavis en sia n-ro 15 ĉefartikolon-alvokon „Al la Kristanoj de ĉiuj Nacioj“ nur en Esperanto, krom tio poemon en germana kaj la ceteran tekston en pola lingvo. Oni nepre devas laŭdi la kuragaĵajn redaktorojn de la du gazetoj, ke ili disponigas en siaj ĵurnaloj tiel vastan spacon por nia kulturo. Ili meritas la subtenon de ĉiuj samideanoj. „Deutsche Rundschau in Polen“ (Germana Revuo en Polio) de 1. dec. represas germanlingve la alvokon el „Nowe Tory“. „Kurjer Bydgoski“ n-ro 4 represas la raporton de IES pri la malsatantaj infanoj en Budapeŝto.


La Gazetara Komitato de GEA
havas la taskon:

1. gajni la germanajn tagĵurnalojn por Esperanto, sed sen logiloj, kiel anoncoj ktp. (Gvidanto: s-ro Hugo Gerisch en Auerbach i. V.)
2. provizi ilin per taŭgaj notoj. (Burglerneja instruisto Naumann en Werdau kompilas kaj redaktas ĉiumonatan raportilon, s-ro Gerisch sendas sur sliĉoj la ĉiusemajnaj „Esperanto-Angulojn“ el la Auerbachaj ĵurnaloj al aliaj gazetoj.)
3. Statistikoj. (Burglerneja instruisto Börning en Werdau.)
4. Esperanto-Gardo. (Rebato de atakoj, refutoj.)

La ĝis nun atingita sukceso estas vere kontentiga. Pli ol 150 gazetoj enhavis lastatempe sciigojn pri Esp. Regulajn „Esp. Angulojn“ enhavas ĉiusemajne aŭ duonsemajne la gazetoj en sekvantaj lokoj:

Tiu ĉi fama marbaneo de Okcidenta Prusujo estas fondita en la jaro 1825 de la d-ro med. J. George Haßner; antaŭe ĝi estis nur simpla vilaĝo de fiŝkaptistoj. La urbo situas tute proksime al la maro; ŝirmata per la arbara monto de Oliva, ĝi havas mildan klimaton kun klara ozonriĉa arbar- kaj mar-aero.

Se oni deziras ĝui la aspekton de supre sur la ĉirkaŭaĵoj de Zoppot, oni supreniru la „Promke-Monton“ apud la pafistodomo; surpriza estas la rava belvuo, kaj senvole la lipoj flustras: Norda Riviero! Je niaj piedoj disvastiĝas la ĝardenurbo, hele lumas la blankaj kampodometoj kun ruĝaj tegmentoj, tra la verdaj



Zoppot. — Kazino.

La ilustrantaj bildoj montras al ni la surmaran ponton kaj la grandiozan kazonon apud la marbordo ornamitan per belega ĝardeno kun du muzikpavilionoj kaj lumfontano, kiu alten ŝprucigas siajn akvoradiojn ĝis 25 metroj.

K. TUSCHINSKI, Danzig.

Auerbach (Zeitung), Ellefeld (Tageblatt), Falkenstein (Anzeiger), Kirchberg (Tageblatt kaj Zeitung), Klingenthal (Zeitung), Lengenfeld (Nachrichten kaj Tageblatt), Mylau (Tageblatt kaj Zeitung), Oederau (Tageblatt), Oelsnitz (Tageblatt), Plauen (Neue Vogt. Zeitung, 40 000 abonantoj, kaj Vogt. Anzeiger, 40 000 abonantoj), Reichenbach (Nachrichten), Rodewisch (Tageblatt), Rothkirchen (Zeitung kaj Tageblatt), Stollberg i. Erzg. (Anzeiger kaj Tageblatt), Suttigart (Tageblatt), Werdau (Tageblatt kaj Zeitung), Zwickau (Nachrichten).

El ĉi tiu listo oni vidas, ke el la nomitaj gazetoj 14 aperas en Vogtlando, 8 en cetera Saksujo, kaj nur unu ekster Saksujo. Do la sukceso estas des pli granda, se oni komparas la malgrandecon de la saksa lando kun la tuta germana lando; sed ĝi estas des pli malgranda, se oni konsideras, ke en la tute cetera Germanio nur unu sola gazeto represas la „angulojn“ de la gazetara komitato. Ĉu el tio rezultas, ke ankaŭ en aliaj regionoj devas starigi similiaj komitatoj? Tute ne! Sed la ĉiulokaj samideanoj nepre devas subteni la laboron de la komitato. Ni atentigas, ke la gvidanto de la gazetara komitato, s-ro Hugo Gerisch en Auerbach i. V., je siaj propraj kostoj sendas la raportojn kaj „angulojn“ al la gazetoj.

de l' arboj brilas la azur-blua maro, kaj la blanksaŭimaj ondoj ruliĝas jen kaj tien en alterna ŝanĝoplena ludo. Malproksime, je la horizonto, salutas nin la landlango „Hela“ kun sia neĝ-blanka bela lumturo. Dekstre troviĝas la haveno de „Neufahrwasser“ kun enira flanko kaj lumturo.

Do, germanaj samideanoj ĉiulokaj, petu de li la raportojn, por ke ankaŭ la gazetoj en via loko ilin represu!

Alilandaj samideanoj, sekvu tiun imitindan ekzemplon!

En kelkaj heslandaj gazetoj aperis akraj atakoj de profesoroj d-ro Hirth kaj Griesbach en Giessen kontraŭ instruistino d-ro Strecker pro lia dekreto pri enkonduko de Esperanto en la heslandaj lernejoj. Trafe respondis, same per gazetartikoloj, instruisto Pfaff kaj d-ro Briegleb en Worms, d-ro Steche, prez. de GEA, en Leipzig, poŝtdirektoro Rieck en Greifswald, s-ro Loy en Kronach kaj s-ro Gerisch en Auerbach.

Pro la festotagoj (Kristnasko, Novjaro, Tri Reĝoj) ET n-ro 13 eliros nur post kristnasko je la 29. dec., n-ro 14 je la 8. jan., kaj de tiam la ĵurnalo denove eliros regule ĉiusemajne.

Al ĉiuj niaj legantoj kaj kunlaborantoj ni deziras

Ĝojan Kristnaskan Feston!

Sep Ŝtatoj por Esperanto.

El „Kölnische Zeitung“ (Kolonja Gazeto) n-ro 1037 de 11-a de decembro ni ĉerpas jenan ĝojigan komunikon pri la Kongreso de la Ligo de Nacioj en Genevo:

... oni intencas fini la laborojn ĝis la 18. dec. La venontaj kunvenoj devos por tio sufiĉe rapide kaj intense labori... Multaj membroj, inter ili Brazilio, Belgio, Ĉinio, Italio, Sudafriko, Hispanio kaj Ĉeĥoslovakio, proponis rekomendi la lernadon de Esperanto en la lernejoj kaj instigis la sekretariejon de la Ligo de Nacioj, prezenti raporton pri tiu ĉi afero en la venonta kongreso.

Deklaracio de la Akademio.

(Decembro 1920.)

La sola deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“.

Nia Esperanto estas vivanta lingvo, kiu laŭnature kreskas kaj kreskos.

Eĉ plibonigo, — cetere ĉiam diskutinda, — kiu rompus nian unuecon, ne plu estus plibonigo, sed la malo.

Enkonduka Letero de la Prezidanto de la Lingva Komitato.

Karaj Kolegoj,

Jen la al vi anoncita Akademia Deklaracio. Permesu, ke ĝin mi enkonduku per kelkaj antaŭvortoj.

La triumfon ni atingos nur per internacia unueco, kiun garantias sole nia fideleco al la Zamenhofa Fundamento.

Ĉefa tasko de niaj Lingvaj Institutioj en la nuna propaganda periodo estas, ne malhelpante la naturan evoluadon de nia vivanta lingvo, konservi tiun ĉi internacian unuecon.

Ne kuŝas nia esenca forto en pli malpli granda perfekteco de la lingvo mem, sed en tio, ke ni ĉiuj uzas saman lingvon komunan.

Sur la lingva kampo, — tial ke lingvo estas ne pure racia, sed ankaŭ konkreta afero, — ne atingebla estas plena racia perfekteco. Sufiĉas, se lingvo estas por ĉiuj facilakirebla*, se ĉiuj homaj pensojn, eltrovojn, laborojn ĝi povas esprimi. Ke tiuj kondiĉojn plenumas efektive nia Esperanto, tion ĝi pruvis dum pli ol tridek-jara periodo ne teorie, sed per faktoj, pli elokventaj ol ĉia rezonado.

Sed, se serĉado de lingva perfekteco estas vana kaj pereiga por la ideo, tute ebla estas kontraŭe nia internacia unueco, kiu kuŝas en niaj manoj. Ni do nenion devas fari, sub preteksto de pli malpli duba plibonigo, kio povus kompromiti tiun ĉi ĝis la fina venko necesejan unuecon.

Ke tia sintenado tute ne malhelpas la evoluadon kaj pliriĉigon de la lingvo, ke ĝi ne estas malprogresema, ke ĝi ne estas ŝtonigo, tion montras la sekvanta Akademia Deklaracio.

Decembro 1920.

TH. CART.

Deklaracio.

Nelonge antaŭ la eksplodo de la milito la Akademio publikigis la *Duan Oficialan Aldonon* al la U. V.*). Pro multaj materialaj malhelpoj

*) Tute pretaj por publikigo estas ankaŭ la korektoj — aprobitaj de la L. K. — de eraraj tradukoj en la Universala Vortaro.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (8-a daŭrigo.)

V.

En la dekdua tago la pasaĝeroj komencis arigi ĉe la ŝipantaŭajo, kiel formikoj sur naĝanta lignero, kiun la vento pelas al la bordo de rivereto. El tio la Loziŝĉanoj konjektis, ke proksime jam devas esti la amerika lando. Efektive, Mateo, kiu havis akrajn okulojn, la unua ekvidis dekstre super la maro kvazaŭ blankan pinton. Ĝi ĉiam iĝis pli kaj pli granda, kaj baldaŭ oni jam povis distingi, ke tio estas blanka lumturo. Sur la maro naĝis boatoj kun oblikvaj veloj, blankaj ŝipoj, kvazaŭ domoj kun fenestroj, malgrandaj vaporsipetoj kun iaj vektaj supre, kiajn niaj Loziŝĉanoj neniam antaŭe vidis. Poste en la blunda nebulo io komencis elnaĝi, io brilanta, blanka, multkolora. Jen insuloj arbaro-kovritaj, jen longa terlango el blanka sablo, sur ĝi fabrikoj aŭ io simila kun alta fornotubego, eleganta nigran fumon.

Dima puŝis Mateon per la kubuto. „Rigardu! La bohemo ja diris la veron!“

Mateo rigardis antaŭen. Tie, pli alte ol la mastoj de la plej grandaj ŝipegoj, staris giganta virina statuo kun levita brako. En la mano ĝi tenis torĉon, etendante ĝin renkonte al tiuj, kiuj el Eŭropo alproksimiĝas nun al la granda amerika lando.

La vaporsipo malrapide antaŭeniris meze de aliaj vaporsipoj, tien kaj reen kurantaj en la golfo, kiel insektoj en lageta akvo. La suno jam estis subrinta, kaj la urbego elnaĝis ĉiam pli klare; kaj domoj kreskis, vicoj da fajretoj ekbruligis, sen-

kaj baroj, pro neebleco de internacia interkomunikigo, pro la morto de ĝia prezidanto, pro la neregula situacio de triono de ĝiaj anoj, kiuj estis rebalotataj, ĝia laboro kompreneble haltis kaj ne povis ne hali.

Sed tuj, kiam la cirkonstancoj ebligis la regulajn balotojn kaj la refunkciadon de niaj Lingvaj Institutioj, la Akademio, senbrue kaj senreklame, sed senprokraste kaj diligente, rekompencis labori. Ĝi ne nur preparas la baldaŭnan starigon de la *Tria Oficiala Aldono*, sed ĝi priŝploras ankaŭ kelkajn aliajn urgajn demandojn, kaj speciale la preparadon de Teknikaj vortaroj.

Tial ke estas certe, ke la antaŭa labormetodo estis iom malrapida, la Akademio atente ekzamenos la problemon pri eventuala reorganizo de la Lingva Komitato kaj modifoj en ĝia regularo.

Ĉar, aliparte, pro troa diskreteco kaj nesufiĉa publikeco de la laboroj de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, multaj Esperantistoj estis inklinaj malprave kredi kaj malĝuste diri, ke la Lingvaj Institutioj dormetas, tial la Akademio de nun konigos la disvolvigon de siaj laboroj per komunikoj sendotaj al la Esperanta gazetaro. La plenaj oficialaj dokumentoj aperos, kiel kutime, en la *Oficiala Gazeto*. La Akademio danke akceptos ĉian kunlaboradon de spertaj kaj kompetentaj Esperantistoj.

La jena deklaracio montras, kiaj estas, laŭ ĝia opinio, la devoj de la Esperantistaro kaj tiuj de la Lingvaj Institutioj.

1. Difino kaj devoj de la Esperantistaro.

Esperanto estas lingvo, kaj same, kiel ĉiuj lingvoj, ĝi estas indiferenta ilo, kiu povas servi al kiu ajn celo kaj ideo. Ĉiu ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure *privata*, per kiu la Esperantismo ne respondas*. Sekve „Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed *ne deviga*“ (Bulonja Deklaracio).

Ĉar Esperanto estas *vivanta* lingvo, ĝi evoluas laŭ natura maniero, same, kiel la naciaj lingvoj, per iomaj post iomaj aldonoj aŭ ŝanĝigoj, laŭbezone eniĝantaj en la uzadon. La sorto de nia lingvo kuŝas do en la manoj de la Esperantistaro mem.

Tamen ĉi tiu povo kaj libereco de la Esperantistaro por riĉigi la lingvon kompreneble ne estas senlima kaj senbrida, nek devas degeneri en pereigan anarkion. La Esperantistaro havas la rajton libere uzi la lingvon; ĝi ne rajtas detrui kaj pereigi ĝin. Evolucio natura tute ne samsignifas, kiel evolucio kaprica, senkritika, senpensa. Ĉar Esperanto estas *internacia* lingvo, ĝia natura evolucio devas fariĝi *internacie*, unuece kaj ĉiulande sammaniere, ne malhelpante la internacian interkompreniĝon. Severa unueco, estante nepra kondiĉo de internacia interkompreno, estas nepra kondiĉo de ekzistado de lingvo internacia, kiun baldaŭ mortigos la pereiga disfalo je diversaj dialektoj.

Tiu ĉi mortiga danĝero ne estas duba, ĉar ĝi kuŝas en la kondiĉoj mem de la vivo de internacia lingvo: la uzantoj de *nacia* lingvo, pro la praktikaj necesoj de konstanta interkomunikigo kaj interkompreniĝo, ne povas libere ŝanĝi aŭ riĉigi la lingvon laŭ persona gusto kaj kaprico; ilia libereco estas severe limigata de la necesa tuta komprenebleco. Por ke ili estu komprenataj, ili devas paroli sammaniere, kiel ĉiuj ĉirkaŭ ili

orde tremadis en la akvo, moviĝis, interkruĉigis malsupre kaj firme staris alte en la ĉielo. La ĉielo fariĝis pli kaj pli nigra, tamen en la aero ankoraŭ klare konturis la eleganta reto de grandega ponto.

Gigantaj domoj ses-sep-etaĝaj staris malsupre, ĉe la dekstra bordo, sub la ponto, kiun ne povis atingi fumo el altaj fabrikoj fornotuboj, ponto, kiu pendis alte super la akvo, kunigante ambaŭ bordojn; grandegaj vaporsipetoj trapasaj boatoj: ĝi estas ja la plej granda ponto en la tuta mondo... Maldekstre de la ponto, jam tute proksime aliĝis la giganta virina figuro, kaj en ĝia frunto, konkurante kun la lastoj radioj de l' estingiĝanta ĉielruĝo, lumis ora diademio; krono el fajroj brilradiis el ĝia alten levita mano.

Dume la koro de Mateo tremetis kaj kunfringiĝis pro teruro. Ĉar nun li komprenis, kio estas tiu Ameriko, ĉe kies bordo li esperis trovi sian fratinojn, Katerinan Lozinskaja, sidantan en kua sia pakajo.

„Mia Dio, mia Dio!“ pensis Mateo: „Sed homo ĉi tie estas ja kiel kudrilo en herbo, kiel akvoputo, falinta en maron...“

La vaporsipo dum du horoj jam naĝis inter la bordoj, kovritaj per konstruaĵoj kaj albordigejoj, sed la urbego ĉiam ankoraŭ disvolvadis super la golfo novajn vicojn da stratoj, domoj kaj lumoj.

De la bordoj, spite la bruidon de la vapormaŝino, aŭdiĝis obtuza, suadiga bruego. Ŝajne, spiras iu grandega, laca, aŭ plendas kaj koleras, aŭ sin turnas kaj ĝemkrias... jen ĝi denove basfajfas, ruliĝas, kvazaŭ vento de l' stepoj, jen ĝi ree parolas multvoĉe...

Mateo elserĉis Annan, la junan orfinon, kaj diris al ĝi:

parolās. La konstanta praktika uzado de la lingvo estas do konstanta senkonscia korektilo kaj kritikilo.

Kontraŭe, almenaŭ en la nuna propaganda periodo, oni ne uzas la *internacian* lingvon por la ĉiutagaj praktikaj urgaj bezonoj de la vivo. Tial la malsamkultimaj kaj malsamtradiciaj homoj, kiuj ĝin uzas nur intertempe kaj precipe skribe, ne povas rimarki, ĉu ili estas komprenataj aŭ ne, kaj ili ne estas devigataj korekti pro nekompreniĝo sian malbonan lingvaĵon.

Por eviti la eblan disfalon de nia lingvo, estas do necese, ke ĉiu Esperantisto, konsciante sian devon, sin korektu mem per interna memvola, plej severa disciplino, inspirante al ĉiuj per sia ekzemplo profundan respekton al la lingvo Esperanto. Neniam oni tro firme konvikiĝos, ke nian Esperantan lingvon oni devas konsideri kun sama respekto, kiel niajn gepatrajn. Neniu certe kuraĝos enkonduki sisteme kaj amase aŭ kaprice en ilin novajn aŭ ŝanĝajn, ĉar tiamaniere oni fariĝus nur ridinda.

La unua kondiĉo de normala progresado, la ĉefa kondiĉo de ne ŝajna sed plena libera vivo, estas tiu profunda respekto, kiu malebligos, ke oni serĉu sen absoluta neceseco novan vorton aŭ esprimmanieron. Neniu, eĉ la plej konservema, malpermesas al ĉiu Esperantisto uzi novan vorton, se ĝin li nepre bezonas. Sed de ĉiuj ni rajtas postuli, ke novaj oni neniam enkonduku senutile kaj senbezone. Cetere, rimarkinde estas, ke ju malpli da fremdaj lingvoj li konas, des pli facile li alportas novajn esprimojn kaj ilin senĝene defendas kun insistado, forgesante, ke la rajto krei vorton estas tute escepta kaj ke tiu ĉi sola ĝin havas, kiu funde scipovas kaj posedas la lingvon. Ni do devas esti *tre singardaj* kun ĉia perfektigado kaj riĉigado de la lingvo, kaj ni devas provi novajn vortojn nur en okazoj de efektiva neceseco.

En la Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto, Zamenhof mem klarigas tute precipe la manieron, kiel la lingvo povas riĉiĝi kaj perfektigi per vojo *natura* kaj libera, sed ankaŭ internacia, singarda, senkonfuzaj kaj sendanĝera: Ĉiu Esperantisto povas riĉiĝadi la lingvon per novaj vortoj, ĉu senkonscie, ĉu konscie, sed neniam senkritike kaj senpense. Li rajtas provi novan vorton nur „per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj, kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo“. Plie, la novajn vortojn „oni devas uzadi nur en la literaturo“... Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas *superflua*.

Ĉiuj Esperantistoj konstante rememoru tiujn saĝajn majstrejn konsilojn. (Finota.)

XIII-a Universala Kongreso de Esperanto 1921 en Praha. Dua Komunikilo.

Fakaj Kunvenoj. — Por faciligi la aranĝon de fakaj kunvenoj, la Loka kongresa komitato transdonis la organizon al jenaj personoj: Blinduloj: S-ro St. Stejskal; Fervojistoj: F-ino Sidonie Dlouha; Instruistoj: F-ino Julie Supichova; Journalistoj-verkistoj: S-ro B. Weiner; Kuracistoj: S-ro D-ro A. Bishitzky; Laboristoj: S-ro J. Šidlo; Liberpensuloj: S-ro R. Hromada; Pacifistoj: F-ino M. Moudra; Poŝtofciistoj: F-ino M. Hemerova, Ruĝa Kruco: S-ro V. Kraus; Skoltoj: S-ro A. Pitlik; Studentoj: S-ro M. Lukaš. Por aliaj fakoj la personoj estas ankoraŭ nomotaj.

„Tenu vin, knabino, proksime al mi kaj al Dima. Jen vidu, kio fariĝas en ĉi tiu Ameriko! Gardu nin Dio!“

La knabino kaptis lian manon kaj, antaŭ ol Mateo povis ĝin retiri, ŝi ĝin kisis. Ĉar la mal-feliĉulino sin sentis nun ankoraŭ pli terurita, ol Mateo.

La tutan nokton la vaporsipo staris en la golfo, kaj ĉiuj pasaĝeroj devis resti sur ĝi. Longe oni sidis sur la ferdeko, poste la plej multaj foriris por dormi. Nur tiuj ne povis dormi, kiujn teruris, kiel niajn Loziŝĉanojn, la nekonata sorto en la nekonata, fremda lando. Cetere Dima la unua ekdormis, sidante sur benko. Anna longe ankoraŭ sidis apud Mateo, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis ŝia mallaluta, malkuraĝa voĉo. Mateo silentis. Fine Anna ankaŭ ekdormis, metinte sian lacan kapon sur sian paketon.

Mateo sola maldormis la tutan nokton, ĝis kiam estingiĝis la lumo en la frunto de la statuo, kaj matenruĝaj briloj kolorigis la ondojn...

Frumatene venis, sur la ŝipegon amerikaj limimpostaj oficistoj, donis iun paperon por subskribi, dum la ŝipego estis malrapide alirata al la bordo. Iom malĝoje estis vidi ĉi tiun maran giganton nun kuŝanta sur akvo, kvazaŭ malvivulo, ne kapabla moviĝi memvole, dum ia malgranda vaporsipeto klopodas apud ĝi kiel vivanta formiko apud mortinta skarabo. Jen ĝi firas ĝin je la vosto, jen ĝi kuras, al ĝia nazo kaj ĉiam fajfas, kaj siblas, kaj sin turnas... La albordigejo estis unu el tiuj grandaj subtegmentaj ejoj, kiuj multenombro troviĝis ĉe la bordo, grandegaj, malbelaj, mallumaj. En unu el ili staris amaso da amerikanoj, laŭte kriante, fajfante kaj bruante. Mateo ekrigardis tien kun la lasta espero vidi la fratinojn kaj ŝvingis la manon. Malĉajlo!

(Daŭrigota.)

Dato. — La kongreso okazos dum aŭgusto; preciza tempo kiel ankaŭ la koŭtizado estas komunikotaj plej baldaŭ.

Komitato. — Partoprenas en la komitato: S-ro St. Kamary, profesoro ĉe la ŝtata reallernejo en Bratislava.

Festaranĝoj. — Antaŭvidataj estas teatra prezentado en la Nacia Teatro, internacia balo kaj ekskursoj.

Aligoj. — 1. S-ro Isbrücker, 2. S-ro Isbrücker (Nederland). 3. S-ro Würth, pastro (Ĉeĥoslovakio). 4. F-rino Ressel, Höflitz (Ĉeĥoslovakio). 5. S-ro B. Straka, Bratislava. 6. S-ro Krestanov. 7. S-rino Krestanova. 8. S-ro S. Degenkamp, Utrecht.

Donacoj. — S-ro Stefan Varzaly en Lansfort: 100 Kr.

Tria Komunikilo.

Dato. — La Dektria okazos de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1921.

Komitato. — D-ro St. Kamary kaj A. Pitlik estas elektitaj anoj de K. K. K. por la Dektria en Praha.

Kongresejo. — Solena malferma kunsido okazos en la „Smetana“ Halo de la Reprezentanta Domo, laboraj kongreskunsidoj kaj akceptejoj troviĝos en la Kazono sur insulo „Zofin“.

Subkongreso. — Sub protektorato de prof. d-ro Cart okazos samtempe subkongreso de la blindaj esperantistoj. En la programo estas paroladoj pri la socia vivo kaj organizado de la blinduloj kaj internacia koncerto de la blindaj virtuozoj kaj kantistoj.

Fakaj kunvenoj. — Katolikoj: organizanto S-ro Zelenka, Kristanoj kaj vegetaranoj: s-ro Tutsch, hebreaĵnaciuloj: s-ro Heller.

Koŭtizado. — La sumo kaj maniero de la monsendo estas baldaŭ komunikotaj.

Aligoj. — 9. S-ro Kronenberg el Bydgoszcz. 10. S-ro Taubmann, Haida. 11. S-ro Bruijn, 's Gravenhage. 12. F-rino Flourens „Roksano“, Beziers. 13. S-ro Toorens, 's Gravenhage. 14. generalo Seberr, 15. S-rino Seberr, 16. F-rino Seberr. 17. F-rino Royer. 18. S-ro Chavet. 19. S-rino Cense. 20. F-rino Gerard, Paris. 21. S-ro Sevenhuijsen, 22. F-rino Sevenhuijsen, Haarlem. 23. S-ro Tarnow, Kiel. 24. S-ro Neuzil, 25. S-rino Neuzilova, Neredin. 26. S-ro Heek, Hengelo. 27. D-ro Möbusz, Lübeck. 28. S-ro Tinteren, Amsterdam. 29. S-rino Heller, 30. S-ro Heller, Limerice. 31. S-ro Jung, Horrem.

Garantia fundo. — Enskriboj po 100 ĉeĥoslovakaj kronoj. La garantiantoj pagos laŭproportio nur, se post la kongreso pruvigis, ke la kongresaj elspezoj superus la enspezojn. Garantiantoj precipe gesamideanoj el landoj kun pli bona valuto!

Donacoj. — Gekursanoj de f-rino Janalikova en Bystrice p. H. 120 kr., Esperantista Klubo en Praha 111 kr., Ĉs. Esp. Informejo (s-ro Hromada) 100 kr.

Deponado de la mono en Praha. — Eksterlandaj geesperantistoj intencantaj deponi en Praha monon, sendu pere de kiu ajn banko al la banko „Bohemia“ en Praha je la konto de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto sian sumon en ĉeĥoslovakia valuto. La kongresa moŝangejo elpagos al Vi ĝin en ĉs. kronaj laŭ la kurso de la tago de la monakcepto (kun procentoj). Pri la monsendo sciigu ĉiam samtempe la ĝen. sekr. de la Loka K. K.

Adreso. — Por nur prikongresaj korespondadoj kaj oficialaj aligoj: S-ro Aug. Pitlik, Nerudova 40, Praha III. Por respondo aldonu respondokuponon aŭ nacian poŝtmarkon.

Por la Loka Kongresa Komitato:

Augustin Pitlik,
ĝenerala sekretario.

Dekdua Brita Esperantista Kongreso.

HARROGATE, je Pentekosto 1921, 15. ĝis 17. Majo. La antaŭaranĝoj por la kongreso bone progresas. La Urba Konsilantaro senpage disponigas la Teknikan Lernejon al ni, kaj en ties ĉambroj okazos la esperantistaj kunvenoj. Publika propaganda kunveno kaj fantazia kostuma balo havos lokon en la Vintraj Ĝardenoj, belega konstruaĵo en la centro de la urbo. Infanoj prezentos ian teatraĵeton de sia eminenta samideano, f-rino Briggs. La kongresa korto kostas tri ŝilingojn kaj ses penceojn ĝis la 18. aprilo, poste la prezo estas kvin ŝilingoj. Kongresbileton kun numero 1 oni akcias por la proiito de la kongresa kaso. Ĝis nun oni proponas 25 ŝilingojn. Tiu, kiu volas posedi ĝin farante donacon al ni, bonvolu sciigi min, kiom li proponas.

Jam starigis Garantia Kaso, kaj la ĝisnuna respondo estas kontentiga. Ĉu la bonvoluloj informos min kiel eble plej baldaŭ pri sia subteno: ian promeson de kvin ŝilingoj ĝis —? oni danke akceptos. Se okazos malprofito (kion, cetere, ni certe ne atendas), oni pagos proporcie. La granda malfacilaĵo venkata estas pri loĝejoj. Ĝis nun la hotelestroj k. s. ne volas doni diskontajn prezojn pro la preskaŭ ĉitaga allogo de kosto de manĝaĵoj. La kongresantoj povas esti certaj, ke ni faros ĉion eblan por kontentigi ĉies bezonojn. La laboro de la komitato farigis ja pli facila, se tiuj, kiuj jam vizitis Harrogate kaj travivis taŭgan loĝejon, bonvolos fari siajn proprajn aranĝojn, samtempe sciigante tion al ni. Tre versajle la fervojaj kompanioj organizas malkarajn vagonarojn, kiel je Kristnasko. Tio multe helpas al ni, ĉu ne?

La North Eastern Railway Co., York, posedas belegan serion da lumbildoj priskribantaj la Valojn de Jorkŝiro. Tiu serio enhavas bildojn de Harrogate kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kiel ankaŭ de kelkaj lokoj (Ripon, Fountains' Abbey) vizitotaj de la kongresantoj. Esperanta legejo akompanas la lumbildaron. La grupoj estas insiste petataj enmeti tiun serion en sian programon. La nura kosto estas la resenda. Petu „set C“ de la Passenger Manager, Advertising Department. Ankaŭ mi prunteprenis serion da lumbildoj pri Harrogate kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj de amiko de Esperanto en Harrogate. Ĝi povas esti lita de mi kontraŭ sendkosto. Esperanta legejo akompanas tiun ankaŭ. Instigu viajn anojn aliĝi al la kongreso, per tiuj du belaj programeroj.

La konsilantaro de Harrogate eldonos esperantan gvidlibron, ekzemplo de kiu estos donacita al ĉiuj kongresano.

Ĉiuj Esperantistoj, aliĝintaj sed ne ĉeestintaj la kongreson, ricevos kongreslibron, gvidlibron, kaj belan emajlan insignon. Tiuj estos bonega memorajo de la kongreso, kiu sendube estos la plej impona kaj grava ĝis nun okazinta en Britujo.

Aliĝu tuj kaj multoblo!
J. T. HOLMES, sekretario,
Roundwood Grange, Baildon, Shipley.

Komerco kaj Foiroj.

Internacia Foiro de Frankfurt a. M.
(Printempo 1921.)

La internacia aŭtuna foiro de Frankfurt a. M., en pasinta oktobro, havis grandegan sukceson por ĉiuj industrioj partoprenintaj al ĝi. Sekve al tio la aligoj por la printempa foiro alvenas multnombro. La 4-a Internacia Foiro de Frankfurt a. M. okazos de la 10-16-a de aprilo 1921. Ĝi reunigos la plejbonajn reprezentantojn de la germana industrio kun iliaj produktantoj. Por la eksterlandano ne ekzistis pli bona informo okazo ol ĉi tiu ĉi printempa foiro. Tio ne sole estos rilate al la abundeco de la elmontrita, sed ankaŭ precipe pro la novmaniera ege iatela kunigo de la ekspozicioj laŭ branĉoj.

La avantaĝo de ĉi tiu sistemo por la eksterlanda aĉetisto estas evidente grandega. Li povas facile orienti sin en la diversaj branĉo-domoj, do ne bezonas serĉi la firmojn ktp. diversekse. Tio estas precipe valora por tiu eksterlandano, kiu ne perfekte parolas la germanan lingvon aŭ tute ne scias ĝin.

La presajoj de la foiro aperontaj en 9 lingvoj kaj en Esperanto estas ĝis forsendotaj. Komence de januaro oni eldonos antaŭ-katalogon kun plurlingva registro. Ĝi enhavos nomaron laŭbranĉe ordigotan de ĉiuj ekspozicioj, kiuj aliĝis ĝis la 31-a de decembro.

Interesatoj povas senkoste ricevi ĉiujn presajojn kaj informojn laŭ la adreso Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M., Germanujo.

Oni petas traduki ĉi-supran noton kaj publikigi ĝin en naciaj ĵurnaloj.

Inter Japanaj Komerclistoj.

OTARU, Hokaido. La ĉi-tiaj samideanoj dissendis poŝte kaj alimaniere propagandajn foliojn al oficejoj de famaj komercistoj, de bankoj k. c.; tridek personoj, ĉefe firmanoj kaj kompanioj, sin turnis al ni. La unuan tagon de la kurso pluvigis okazis publika lekcio de d-ro T. Ueda el Tokio ĉe Otaru Klubo. Pro tiuj kaitoj kunvenis nur dudek personoj ĉe ĉi kurso en Kumiai Kĵokai (preĝejo). Tamen post tiu tago ni akiris dudek kelke da novaj aliĝintoj, plejparte kompanianojn de Micui bussan Kaiŝa, laŭ kies peto ni aranĝis novan kurson speciale por ili merkrede ĉe Sanju Klubo (klubo por la nomita kompanio). Tiun kurson ĉeestas 30 kompanianoj, inter kiuj sin trovas vicdirektoro de Otaru Branĉo de la kompanio, s-ro Jamamoto. La kurso ĉe Kumiai Kĵokai ĉeestis en la dua leciono tridek personoj; la novaj aliĝintoj estas studentoj de supra Komerca Kolegio kaj instruistoj de elementaj lernejoj.

Germanio.

KOLONJO-Mülheim. S-ro Wilbert gvidas kurson kun 16 komercistoj.

Poŝto.

DUESSELDORF. (Germ.). S-rano N. Barthelmess instruas Esperanton al 12 poŝtoficistoj, kiuj bone progresas.

Lernejo.

KOVNO (Litov.) S-ro P. Medem faris propagandan paroladon en la hebrea gimnazio. Krom gimnazianoj ĉeestis la direktoro kaj kvar instruistoj. Multaj lernolibroj venditaj. Kurso kun 96 ĝelernantoj sub gvidado de s-ro J. Maĉernis.

Internacio Katolika.

Lia Papa Moŝto kaj Internacio Katolika.

Lia Papa Moŝto akceptis la ĉefdirektoron de „Ika“, S-ron D-ron Metzger, la 12-an de Oktobro en privata aŭdienco, por ricevi raporton pri la fondo-laboroj kaj la programo de „Ika“.

Lia Papa Moŝto jam bone estis informita de Lia ŝtata sekretario, Kardinalo Gasparri, longatempe interparolis pri la celoj de „Ika“ kun d-ro Metzger kaj tre ĝojis pri la jam faritaj por ĝi laboroj.

Precipe li interesiĝis pri la eldono de internacia katolika organo, kiu ĝis nun ĉiam estis malebligita pro la demando pri ĝia lingvo.

Lia Papa Moŝto memorigis pri tio, ke ekz. ankaŭ la pripapaj konferencoj en Versailles estis malkelpataj grandparte de la diverslingveco de la partoprenantoj, ĉar Wilson, Clémenceau kaj Lloyd George ne povis interkompreniĝi.

Antaŭ ĉio Lia Papa Moŝto deziris la daŭrigon de la laboroj por paco, kiujn organizis la „Mondpaciga Kruco Blanka“. Benedikto XV-a diris:

„La homoj opinias, ke nun ni havas pacon, ĉar la sangoplenaj interbataladoj ĉesis. Sed tio ne estas paco. Paco estas „tranquillitas ordinis“ (frankvileco en ordo). Kaj ordo estas justeco kaj amo. Sed da ambaŭ oni ĝis nun vidas tre malmulton.“

Lia Papa Moŝto fine promesis al D-ro Metzger subtenon de liaj laboroj kaj donis Apostolan Benon al lia entrepreno.

Societa vivo.

CHEMNITZ (Germ., Saks.). Esperanto revigliĝis en Ĥh. La kunsidoj (ĉiujade vespere en „Arnolds Theatergarten“, Theatersr. 46) estas vizitataj pli kaj pli multnombro. Tri gazetoj estas elmetataj, inter ili ankaŭ ET. Dankon ni ŝuldas precipe al s-ro instruisto P. Arnold, kiu por Esp. ofereme kaj sukcese laboras. Kursojn gvidas s-rino Melzer, A. Nagel, H. Nagel, Arnold kaj Schneider. Novaj kursoj estas preparitaj. Estas ĝoige, ke ĉi urbo-kaj lernejo-estraroj favoras Esperanton. Ili permesas la enkondukon en la lernejojn kaj permesas la uzon de urbaj instruadomoj. Ankaŭ la laborista grupo instruas kaj ekzercas en urba lernejo. Ĝi ankaŭ ricevis permeson por instruado al ĝefanoj. Por tio anoncis sin ĉ. 150 partoprenantoj.

Dank' al la klopodoj de s-roj Büttner kaj Schneider komencis du Esp.-kursoj ĉe la Saksa Land-Polico en Ĥh. kun 60 partoprenantoj. Por 20 partoprenantoj baldaŭ nova kurso komencos.

Informejo por Esp. aferoj estas tie ĉi la „Verein für Fremdenverkehr“ (Unuiĝo por Fremdultrafiko), Jakobi-Kirchplatz 1/l. Ĝi donas volonte informojn ne nur pri Esp. aferoj, sed ankaŭ pri Chemnitz'aj fabrikoj, komercaj, kulturaj ktp. aferoj. Eksterlandanoj, kiuj bezonas maŝinojn, instrumentojn, trikotajojn, gantojn, ŝtrumpojn ktp., bonvolu skribi Esperante al ĝena informejo.

Laste mi aludas pri bronza aŭto sur Chemnitz'a ĉefstacidomo. La Esp. ligo aĉetis ĝin por 120 mk. kaj fiksis ĝin en la stacidoma halo, atengigante ĉiun vojaĝanton je Esperanto kaj ĝia informejo.

Esperanto marŝas, ankaŭ en industri-urbo Chemnitz. La internacia komunikilo ĝi bezonas Esperanton, tial ni venkos. (Kl.)

HIRSCHFELDE. (Germ., Saks.) Post finita kurso fondiĝis loka grupo. Prezidanto estas la instruisto s-ro Robert Pfennigwerth.

DANZIG. La lasta ĝenerala kunveno de Danziga Esperanto Asocio estis vizitita de 62 personoj. Oni elektis prez. Ketterling, vicprez. Kavecki, sekr. Amort. — Por kurso gvidota de f-rino Schultz anoncis sin 55 personoj. La unua kursvespero rezultigis enspezon de 520 mk. La kurso okazas vendrede je 6.30 h. en gimnazia ĉambro de Supera Tria Klaso. — La asocio projektas grandan maskofeston, por kiu ĝi dissendis 3000 invitilojn. La profito el la festo estas uzota por grandmezura propagando.

BELGA KONGO (Meza Afriko). En Banalya en la distrikto Stanley Falls, 450 kilometroj de Lokandu, misiiste laboras samideano p-ro L. A. Marevee de la S-ta Koro de Jesuo, kaj en Lokandu estas fervora kunfrato lia esperantista p-o L. Jenkins, ankaŭ misiisto.

Nekrologio.

Aleksandro Boleslaw Brzostowski

mortis 71-jara la 14. nov. en Varsovio (Pol.). Li estis unu el la plej malnovaj propagandistoj en Polujo, kiu antaŭ multaj jaroj kiel ĵurnalisto jam sukcesis presigi en polaj gazetoj propagandartikolojn pri Esp. Multjara komitato de Pola Esp. Societo, en kiu li kun speciala ampleno flegis la bibliotekon kaj kolektis tre riĉan materialon por la estonta Esp. Muzeo. La polaj samideanoj funebrias tiun sorbaton. (Ad. Oberrotman.)

Abono finiĝas je n-ro 12:

Blumenthal en Heinersdorf (vidu ankaŭ la antaŭan numeron!).

Abono finiĝas je n-ro 13:

J. W. F. Poolen kaj Hirsch Blum en Rotterdam. Poupeye en Sint Kruis. Jalava kaj „Polusstelo“ en Helsinki. Cernohovostov en Alberg, Lindqvist en Lahti. Grau en Barcelona. Smetak en Praha. Wuttig, Felke, Berg, Ganz, Kreitschmann, Elsner, Obersky kaj Borchardt en Berlin. Mommertz en Hehn.

Abono finiĝas je n-ro 14:

Bochichio en Potenza. Blackett en Bath. Birk en Tallinn. Atilla kaj Rosta en Helsinki. Mahn en Berlin. Lehmann en Berlin-Fr. Hiller en Bamberg. Alband en Düsseldorf. Thomalla en Magdeburg. Flatters en Mainz. Kahlert en Neustadt. Lauerhaas en Nürnberg.

Abono finiĝas je n-ro 15:

Applebaum en Liverpool. Dabrowski en Rzeszow (bonv. pagi al s-ro Oberrotman en Warszawa). Suuronen en Helsinki. Vidikauskas en Philadelphia. Schlüter en Dortmund. Klafs en Düsseldorf. Mausfeld en Hagen (du abonoj) Faber en Stolberg (unu abono, la dua valoras ĝis n-ro 24, la tria ĝis n-ro 33). Hornung kaj Gerisch en Auerbach. Hofman en Chemnitz. Zimmermann en Nürnberg.

Kelkaj el la ĉi-supre cititoj intertempe jam repagis.

Parolejo.

37.

LA NOMO DE NIA ĴURNALO.

(Rilatas al 29.)

La nomo de nia ĵurnalo tre interesas la abonantojn. Eniris ĝis nun 16 proponoj. 10 estas por konservado de la ĝisnuna titolo, 5 deziras ŝanĝon je „Esperanto semajna“ kaj unu proponas „Esperantulo“. La konservemuloj de la malnova titolo estas la pli arte-entuziasmaj, dum la proponantoj de la nova titolo estas la pli praktikemaj; el la lastaj unu eĉ proponas la forigon de la vorto „Esperanto“ de la titolo, konsiderante la ĵurnalon kiel parenkan al naciaj ĵurnaloj. Ni deziras konservi la vorton „Esperanto“ pro sugestii la ne-esperantistan publikon; tial ni ankaŭ ne tre ŝatas „Esperantulo“.

Ne povante publikigi ĉiujn proponojn, ni jen presigas nur la nomojn de la proponintoj. Proponis konservon de la ĝisnuna titolo: P. Medem, Kovno; P. Balkanyi kaj Jozefo Major, Budapest; J. Altnöder kaj Hans Nüsslein, Regensburg; prof. P. Christaler, Stuttgart; Willy Sieler, Gera; G. Mansfeld, Merseburg; d-ro W. Wunsch, Berlin; Leono Funken, Koblenz.

Proponis ŝanĝon de la titolo je „Esperanto Semajna“: Ch. G. Stuart-Menteth, London; Cecil C. Goldsmith, Birmingham; R. Kreuz, Frankfurt; Walter Lippmann kaj Johs. Landmann, Leipzig.

Propozita titolon „Esperantulo“: d-ro Schacht, Zürich.

LA ESTONTO.

En n-ro 7 de ET (dekreto de la Heslanda instrumestro) oni legas „en la estonto“; preferinda esprimo estas „en estonttempo“ aŭ „estonte“.

KRITIKO JE ET.

Mi tre ŝatas vidi en ET post la envicigaj nombroj punktojn; ekz. la 5-20. [de] sept.; ne: la 5 ĝis 20 sept., kion oni legas: la kvin ĝis dudek septembroj.

En ET 6 sur la 4-a paĝo devas esti en la maldekstra rubriko, 2-a alineo: movas; 3-a k. 6-a alineo: dirate, ne: movigas kaj dirante; ĉar ĉi tiu ja rilatas al la subjekto de l' ĉefa frazo.

En ET 10, IES, mallaudindaj; panrusa (pano?), subŝidi (sub-sidi?); nekonoj; milingo (?), balotrafono (distrikto?).

RIM DE RED. La redakcio de ET ĉiam plezure akceptas seriozan kritikon pri la enhavo. Koncerne la postnombrajn punktojn de la dato la kritikinto pravas; kvankam la francoj ne skribas punktojn de la dato, estas konsilinde, ke la esperantistoj ne imitu tiun ekzemplon.

La erara uzado de „movigi“ anst. „movi“ estas tre ofta inter la samideanoj, same la uzado de neuzataj participoj. Do estas bone, atenci pri tiuj eraroj.

„Rayon“ en franca lingvo signifas „radio, radradio, breto, fako, distrikto“; ĝi estas superflua vorto, ĉar sufiĉas „distrikto“. Same ne necesa estas „subŝidi“ anst. „subvencii“.

„Milingo“ estas vorto jam uzata precipe de angloj kaj amerikanoj; ĝi devenas el angla „meeting“ kaj signifas „kunveno“, „kongreso“; ankaŭ ĝi estas ne necesa.

La anstataŭaj esprimoj donitaj de s-ano F. por „panrusa“ ne tute trafas la sencan de la el greka lingvo devenanta „pan“; eble ni diru „altirusa“, tutslava, tutgermana ktp.

Recenzejo. LIBROJ.

LA FIANĜIGO. — LEA. Du unuaktaj teatraĵoj en unu volumeto, de Aleksis Kivi. (Fina Biblioteko Esperanta N-ro 5.) El finna lingvo tradukis Hilma Hall kaj Linari Ekström. 62 pĝ. 12 1/2 cm. Helsinko (Helsinki, Finnlando). Eldona akcia societo Otava. Havebla ĉe Esp. Oficejo Finnlanda en Helsinki. Prezo 4 fmk.

La aŭtoroj, kies biografion ni legis en n-ro 2-a de la sama biblioteko, ni jam konas. Li estas la verkinto de la komedio „La Bojstoj“, kies tradukinto estis f-ino Hall. Ni kore dankas sin kaj s-ron Ekström, ke ili konigas al ni bonajn finnajn literaturaĵojn.

La Fianĝigo estas mallonga komedio, kies intrigo ne estas tre impresigaj, sed mi ne dubas, ke la prezentado sur la sceno estas tre efika. Ankaŭ la tradukinto atentigas pri tio. La teatraĵo estas pure finlanda laŭ la enhavo, kiun mi ĉi tie ne volas detale rakonti. La leganto ĝuu mem. Laŭŝajne la finlandanoj emas al interbatiĝo; precipe la viroj estas tre malpacemaj minacante per bastonoj kaj insultante unu la alian per moka uzado de bestonomoj. Ĉu eble la norda klimato estas kulpa je tio?

La traduko estas tre bona kaj preskaŭ ne rimarkinda. Preserarojn mi ne trovis. Papero kaj prezo de la tuta libro estas bonaj. Kelkaj gramatikaj strangaj rezultoj sendube el la silo de la finna lingvo. Malĝustoj estas: Koncerne unu afero (anstataŭ: unu aferon). Ili tabakon (per simpla ŝarado la tabakopovo ne enigas en la nazon; la sencu estas: spirante [flarspirante?] spirilarante? enspirante?) supreniri la tabakon en la nazon. Novaj vortoj estas sledo (ĝililo?) kaj galimatio (konfuza babilado). Blato estas speco de skarabo. La vorto; mufiŝingo estas la esprimo; amanto (vidu: vortaro de Boirac, latine: amantia muscaria). Kion signifas garantementi? Ĉu garanti? Anstataŭ: mi restus loĝi, mi preferus: mi restus loĝanta.

Sed la malmultaj nekorektaĵoj tute ne domagas. Ĉiu tragikos ridante ĉi tiun komikan teatraĵon, kies bonstila traduko tre plaĉas. La dua teatraĵo estas biblia rakonto de okazintaĵo dum la vivo de Kristo. Lea estas la filino de la estro de l' impostistoj Zakeo en Jericho. Ni jam konas la rakonton el la Biblio. Kivi maistre skizis la karakterojn, la impostiston Zakeo, lian filinon kaj la fariseon Joas, kiu per siaj tutaj fortoj kontraŭstaras la Kristanismo.

Sed ĉi legu mem kaj travivu spirite la tiaman tempon, en kiu en la mondon venis nova sento. La traduko estas bonega. Mi trovis nur unu preseraron. La tradukinto uzis dufoje malĝuste adjectivan formon anstataŭ adverba. Anstataŭ sidigis mi dirus sidigis sin. Malĝustoj estas: ĝis mi revidos. Devas esti: ĝis kiam mi revidos. Oni ne rajtas uzi prepozicion anstataŭ konjunkcion en la ĉiita frazo.

Entute: bonstila traduko kaj tre leginda verko. „Lea“ estas teatraĵo bonega taŭganta por prezentado en esperantistaj unuoj dum la kristnaska tempo. La rajton de prezentado oni akiras per akto de ses ekzempleroj de la tuta libro.

Mi ripetis resume: La numero tria de la Finna Biblioteko Esperanta estas valora priligo de nia Esp. literaturo, kaj mi varme rekomendas la libron al ĉiuj samideanoj. (G. Aul.)

ESPERANTO-KATALOGO (nov. 1920) de la edonlogo Ludvig Fries (Germ. Esp. Librejo), Leipzig, Johannisplatz 3. Bele farita, 16-paĝa, kun verda kovrilo. La katalogo estas nova pruvo por la riĉa ero de Esp. literaturo kaj aliaj Esperantistoj.

AMERIKA ESPERANTISTO. Sept. kaj okt. En la sept. n-ro lustrita raporto pri la kongreso en Hago. La okt. n-ro kun raporto pri la sesa jarokunveno de la Kalifornia Esp. Rondaro en San Francisco (9. Okt.)

ESPERANTO. Nov. Artikoloj de Edmond Privat: Lingva Komitato kaj Akademio, kaj de Ed. Stettler: Ŝakludo inter Esperantistoj. Aliaj interesaj legaĵoj. La kotizo al UEA estas altigitaj por landoj kun malbona valuto; la membreco kostas por aŭstroj kaj hungaroj 80 kr., germanoj 16 mk., poloj 50 mk., finnoj 18 mk. ktp.

ESPERANTISKY ZPRAVODAJ. N-ro 2. Nur en bohema lingvo. ESPERANTO PRAKTIKO. Dec. Finas sian duan vivaron. Intencas publikigi en venonta jaro pli da Esp. kaj malpli da germ. tekstoj, plenumante la deziron de la neatendite grandiginta abonataro eksterlanda.

ESPERO KATOLIKA. Nov.-dec. Enhavas raporton pri la aŭdienco de d-ro Metzger ĉe la Sankta Patro pri la aliaj legintoj.

GERMANA LABORISTA ESPERANTISTO. Dec. En Esperanto; raportoj en germana lingvo.

Eksportado. Importado. Germana Esperanta Komerca Korporacio Berlin-Steglitz (Germ) Telegrafa adreso: Germespero Berlin. * Telefono: Steglitz 5828. Komisioj de ĉiuspecaj komercaĵoj, speciale parfumoj, drogoj kaj tualet-artikloj ĉiulanden. Automobil- kaj Film-Eksportado. Sendu katalogojn kaj informojn! Esperantia Entrepeno. Reprezentado. Perado.

Ĉu vin interesas la Hungaroj? Legu la plej malkaran Esp. gazonen. Hungara Esperantisto. Szeged, Szentharomsag u. 30. Monata revuo tute en Esperanto. Prezoj por tuta jaro 1 sv. fk., 1.50 fr. fk., 1 ŝil., 10 cend., 5 g. mk. ktp. Samideanoj ĉiulandaj, helpu la aperon de la sola organo esperantista en Hungario! Abonu ĝin! Mi akceptus Rerezentadon aŭ agentecon de eksterlandaj firmoj rilate importo al Hungarlando. Georgo Steiner, Györ (Hung.) Kletzarstr. 12. Anoncetoj.

BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Ĝus aperis dua eldono, kiu enhavas 1200 adresojn. Praktike aranĝita, bezoniga libreto por ĉiuj. Kostas 1,50 fk. sv. (6 mk. g. aŭ 6 resp.-kup.) * Oni akceptas ankaŭ poŝtmarkojn. Postulu senpagan prospekton! Aliĝu al 3-a Eldono sendante vian adreson kaj personajn informojn kune kun 2 fk. sv. (8 mk. g. aŭ 8 resp.-kup.) al: Bohema Esperanto Servo * Moravany (Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo) Ĉiu aliĝinto ricevos senpage 1 ekzempleron.

Oni postulu detalajn prospektojn pri libroj ĉiuspecaj por junaj komercistoj, kiuj volas kompletigi siajn spertojn, por instruistoj, instruistinoj kaj ĉiuj ajn personoj. — Resendkosto. Versand-Geschäft „Adelo“, Charlottenburg II, Ulland-Str. 184. — Poŝtekkonto Berlin 81069. —

Lingvaj Respondoj de D-ro Zamenhof. Por ke ne ankaŭ aliaj samideanoj komencu egalan laboron, ni atentigas niajn legantojn, ke s-ro Walter Lippmann prilaboris la Lingvajn Respondojn de D-ro Zamenhof kaj baldaŭ publikigos tiun ĉi verkon (ĉe Germana Esperanto-Librejo, Leipzig). HISPANA ESPERANTISTO. Sept.-okt. Ni ripetis, kion ni jam diris pri la antaŭa n-ro: Gazeto malbone presita sur bona papero. La belaj ilustraĵoj faras nian impreson pro la malbona prezo. La enhavo ne estas laŭdinda. Multaj preseraroj (iam en la unua frazo: Saussure estas la elpsinta de la supraj nomoj). La vorto povus esti unu el niaj plej belaj, se oni iom prizorgus ĝin. HUNGARA ESPERANTISTO. Nov. La unua numero, kiun ni ricevis de tiu ĉi gazeto eliranta en Szeged, Szentharomsag uca 50. LA ESPERANTISTO. Sept.-okt. Alifigis nin sufiĉe maltriste. La enhavo estas bona kaj interesa kiel ĉiam. Sed ĉu estas ĝuste diri, la gazeto estas malkarega, se ĝi aperas jam nur ĉiun duan monaton? LA ESPERO. Sept.-okt. En sveda lingvo kaj Esperanto. LA REVUO ORIENTA. Okt. Enhavas interesan raporton pri la Sepa Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Tokio kaj aliajn legindaĵojn. LA VERDA OMBRO. Okt. Kun ekstrakteto de „La Verda Kakatuo“. L' ESPERANTO. Okt.-nov. Kun Itallingva raporto pri la Kvin Kongreso de la Italiaj Esperantistoj. MONATA BULTENO, Sabadell, Nov.

Luigi Puppo, via del Bragone 1-3, Genova-Sturla (Italujo), deziras ricevi sciigojn pri lingvaj kaj propagandaj organizoj, pri praktikaj aplikoj, pri jurnalismo, literaturo, movado kaj historio de Esperanto kaj ldo, kaj pri teorio de ldo. Döbner Fedoresak, Budapest IX, Nador utca 27, deziras korespondi per Pl. S-ro d-ro Stefano Bodnar, Budapest IX, Mester u. 3, deziras korespondi per PK, Pl kaj L, prefere kun kuracisto kaj dentkuracisto, kaj interŝangi PM. S-ro Rudolf Leopold, kompostisto, Hirschfelde (Saksujo, Germ.), deziras korespondi kun sinjorino el Finnlando, Svedujo aŭ Rusujo. Heinrich Lorenz, Koblenz (Germ.), Bahnhofstr. 25, deziras korespondi kun anoj de ĉiuj landoj; ĉiu karto estas respondota. Mi ankaŭ interŝangas poŝtmarkojn kaj sendas por ricevataj stampitaj markoj la saman kvanton da germanaj stampitaj poŝtmarkoj. Stuttgart (Germ.), Hans Böning, Libanonstr. 45, sendas por PM interŝange PM, Pl, EG, PK kaj Libr. Stuttgart (Germ.), Hans Wolf, Heschlag Hahnstr. 60, sendas por PM interŝange PM, Pl. Stuttgart (Germ.), Wilh. Gutmann, Landhausstr. 55 B, interŝangas PM. Stuttgart (Germ.), Jakob Mack, Römerstr. 55, interŝangas PM. Stuttgart (Germ.), Max Schuen, Reg.-Baumeister, Ostheim-Louisenplatz 6, interŝangas nur virmbergajn PM. Paul Mühe, Hagen i. W. (Germ.), Minervastr. 1, deziras interŝangi ĉiulandajn il. PK kaj L kun samideanoj. 4 junaj blindaj samideanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj vidantoj kaj blinduloj. Adreso: Budapest VII, Hektikbistr. 60, Izraelia Instituto por Blinduloj. Heinrich Steinbrenner, Ziegehhüttenweg 1, Frankfurt a. M.-Stid (Germ.), Pl. L kun ĉiuj landoj. Wilh. Natalie, Stidelstr. 6, Frankfurt a. M.-Stid (Germ.), Pl. L kun ĉiuj landoj, korespondas pri specialaj temoj. Adolfo Iler, Brahmstr. 6, Frankfurt a. M. (Germ.), Pl. L prefere pri lando kaj popolo, moroj, politiko ktp.